Heinrich Heine,

# Pinarbo staras sola

*tradukita de Friedrich Pillath*

Pinarbo staras sola
En nordo sur nuda altaĵ'.
Ĝi dormas; el neĝ' kaj glacio
Ĝin kovras blanka litaĵ'.

Sonĝadas ĝi pri palmo
Ĝemanta en orient',
Soleca, sur arda deklivo
En maldolĉega silent'.

*Traduko de la Germana poemo "Ein Fichtenbaum steht einsam" de* HEINRICH HEINE *(*1797-12-13 – †1856-02-17) en Esperanton de* FRIEDRICH PILLATH *(†1932-04.03).*

*Arg-1023-2287 (2015-03-19 16:43:44)*

*Tiun ĉi poem-tradukon mi, Manfred Retzlaff, trovis en* `http://donh.best.vwh.net/Esperanto/Literaturo/Poezio/heine/pinarbo.html`.

Heinrich Heine,

# En nord' unu pino

*tradukita de Ludwig Lazarus Zamenhof*

En nord' unu pino en solo
Dormetas sur nuda altaĵo;
Glacia kaj neĝa tavolo
Ĝin kovras per tomba tolaĵo.

Ĝi sonĝas, ke palmo gracia,
En unu dezert' orienta,
Eterne pri lando alia
Malgaje sopiras silenta.

*Traduko de la Germana poemo "Ein Fichtenbaum steht einsam" de* HEINRICH HEINE *(*1797-12-13 – †1856-02-17) en Esperanton de* LUDWIG LAZARUS ZAMENHOF *(Ludoviko Lazaro Zamenhofo, *1859-12-15 – †1917-04-14).*

*Arg-1023-2073 (2014-05-23 14:27:37)*

*Tiu ĉi Zamenhofa poem-traduko troviĝas en* `http://edu.i-lo.tarnow.pl/esp/lern/librejo/0012/0008.php`.